

N°171
juillet
août
septembre
2015

LA INFORMILO

N° 171
julio
aŭgusto
septembro
2015

l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières



Esperanto
la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj



ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 15€

Reta abono: 7,50€



Ils sont membres d'Espéranto France-Est et ont participé au centième congrès mondial d'espéranto à Lille. Et ils ne sont pas tous sur la photo!!! Pendant une semaine près de 2700 congressistes originaires de 80 pays se sont réunis au Zénith de cette belle ville du Nord de la France. Ils ont participé à une multitude de conférences et débats et ont assisté à de nombreuses pièces de théâtre et concerts. **Leur seule langue de communication: la langue internationale ESPERANTO!!!**



Ĝemel-urba renkontiĝo en Alkmaro

Dum la ĉielira semajnfino, de jaŭdo la 14a ĝis dimanĉo la 17a de majo, okazis en Nederlando ĝemel-urba renkontiĝo organizita de la alkmaro grupo.

Niaj gastigantoj preparis por ni ĉiuj (germana grupo el Darmstadt, itala grupo el Brescia, hungara grupo el Tata kaj ni, franca grupo el Troyes) belegan tre diversan kaj multe interesan programon.

Ĉar ni loĝis proksime de la maro en Petten (en la ĉirkaŭaĵo de Alkmaro) ni profitis de tiu: tuj post nia alveno kaj post simpatia kaj varmece akcepto de niaj nederlandaj amikoj (per kafo, teo kaj kukoj!) post nia instalaĵo en nia loĝejo, ni promenis laŭ la marstrando por vidi grandiozan sunsubiron... Tiu unua promonado estis ideala okazo (re) interkonatiĝi.

Denove vendredon matene ni havis rendezuon kun la maro dank'al tri tre diversaj sed same agrablaj agadoj: prelego pri "sablo kontraŭ maro", promonado sur la strando por spekti la akvo-laboron, kaj kolekto de konkoj kun trueto por fari posttagmeze kune kun ventsonoriloj. Tiu originala kaj luda man-aktivaĵo multe plaĉis kaj ankaŭ favoris la parolajn interŝanĝojn.

Vespere post bongustega vespermanĝo niaj organizantoj regalis nin per koncerto, en kiu partoprenis kelkaj el niaj gastigantoj. Loterio dum la paŭzo eldortis iujn inter ni per libroj kaj donacetoj.

Sabaton matene ni vizitis la historian preĝejon de Schermerhorn. En tiu ĉi vilaĝo staras ankaŭ malgranda dometo, kiu ŝirmis familion el ses anoj en 26 kvadratmetroj! Poste, ni vizitis muelejon (simbolo de Nederlando!) kaj havis boatveturadon tra Eilandspolder: tio estis tre agrabla, ripoziga kaj samtempe instrua, ĉar ni vidis multajn nekonatajn birdojn, florojn, ktp. Ni renkontis aliajn bestojn en medio-rotekta farmbieno de Middenbeemster: bovinojn kaj eĉ kaprinojn. Ankaŭ ni spektis la mekanikan melkadon de la bovinoj...

La kultura vespero ebligis la malkovron de la talentoj de niaj italaj kaj hungaraj amikoj: ĉu kante, ĉu poezie! Denove por fini la vesperon ni aŭskultis muzikon dank'al la nederlanda ĥoro Malvo, kiu kantis esperante, sed ankaŭ nederlande.

Dimanĉon matene ni vizitis lokon kiu proponis la alian simbolon de Nederlando (post la muelejoj!): Tulpenland (Tulip-lando), kie centoj da multkoloraj tulipoj konstituas veran paradizon – kiel estas skribite!

Post lasta teo aŭ kafo ni devis bedaŭrinde forlasi la Tulip-landon kaj pli malĝoje Nederlandon kaj niajn karajn gastigantojn, kiuj tiel bone kaj kore akceptis nin kaj prizorgis pri ni, esperante revidi ĉiujn eble dum la venonta renkontiĝo en... Troyes (Francio)!

unu el la du boatoj sur la kanalo



la piedoj de Laurent kaj Bert en la norda maro

preparado de vent-sonoriloj el konkoj



la partoprenantoj el esperanto10 antaŭ la tulipoj

la organizantoj el la alkmaro grupo





Postkongreso al la nordo, al Belgio (Flandrio)

En Lillo UEA proponis du postkongresojn, al suda Francio kaj al Belgio. Pro manko de partoprenantoj okazis nur la postkongreso al Belgio.

En la vendreda kunveno pri postkongreso la partoprenantoj jam ricevis utilajn informojn kaj la tutan programon pri la ĉiu-tagaj ekskursoj.

Sabate matene okazis la ferma ceremonio de tiu ampleksa kaj grandioza 100a Universala Kongreso. Ĝi estis plena je emocioj kaj surprizoj. La kongresa flago estis transdonita al la organizantoj de la venonta UK en Nitra, Slovakio.

Tuj post tiu mirinda ceremonio kaj salutado al konatoj, la postkongresanoj troviĝis ĉe la aŭtobuso por pluveturi al Belgio, kies landlimo troviĝas tute proksima al Lillo.

La turismado de tiu postkongreso estis organizita de surlokaj Esperanto-grupoj, tial la etoso estis pli agrabla kaj simpatia ol pere de firmao.

Antaŭ ol transiri la tute proksiman landlimon al Belgio okazis la lasta tagmanĝo en kafeterio en Francio. Poste la celo estis atingi la urbon Gento. Tie en la centro de la urbo troviĝas oportuna hotelo IBIS por ĉiuj partoprenantoj kaj por la tuta postkongreso.

La programo klare anoncis, kiuj manĝoj estis memvolaj aŭ organizitaj.

En tiu unua tago eblis viziti la belfridon, kie troviĝas la kariljono. Sed ne eblis por turistoj atingi la kariljonon-mem, tial iom escepte la kariljonisto troviĝis sur la ĉefa placo por de tie manipuli la klavaron.

Gent estas la kvara urbo de Belgio kun 250 000 enloĝantoj. Allogas la multaj piediraj stratoj, tial ĝi aspektas historia muzeo kun mez-epoka flandra stilo. 🇧🇪

Post la vespermanĝo estis planita bier-gustumado. Fakte ne nur gustumado, sed ankaŭ ampleksa prelego pri belgaj bieroj, pri ties historio, pri kvalito kaj tradicioj. Ni gustumis diversajn bierojn, la blankajn, la trapistajn, la pilsenajn kaj aliajn.



Kariljono estas frapinstrumento konsistanta el multaj diversaj metalaj sonoriloj, kies frapiloj estas konektitaj al klavaro: la studprogramo daŭras ses jarojn kaj ampleksas kariljonludadon, muzikteorion, harmonion, kariljon-historion, sonoril-sciencan, komponadon kaj kariljon-aranĝadon, grupan kantadon kaj gimnastikon. Ĉe malgrandaj kariljonoj la kariljonisto uzas frapilon kvazaŭ martelo.





En la posta tago, ni konatiĝis kun la urbo Gent, riĉa flandra urbo kun ekonomia bonfarto, ĝi sukcesis konservi gravan parton de sia ekonomia heredaĵo. La urbocentro atestas pri la mezepoka flandra riĉeco kaj komerca sukceso.

Gravaj konstruaĵoj estas la belfrido kaj kaj la grafa kastelo. Ĝi estas la ununura restanta fortikigita kastelo de Flandrio.

La mondfama pentraĵo *Adoradode la Dia Ŝafino*, videbla en la katedralo, estis kultura produkto de la iama mezepoka ekonomia bonfarto.

La urbo havas gravan havenon, kiu akceptas marŝipojn alportantajn varojn al la urbo kaj al la industrio malantaŭe en la lando. La graveco de ĝia universitato daŭre kreskas .



Vizito al leper, kie troviĝis la flandraj batal-kampoj de la unua Mondmilito

Ieper estas mondkonata pro Iperito, la t.n. mustarda gaso, kiu estis unue uzata dum la Unua Mondmilito kaj havas terure mortigan efikon. La uzado de venenaj gasoj estis tamen nur unu el la aĉaj kulminoj de la barbareco. La t.n. Granda Milito estis ankaŭ la unua milito, kie oni batalis kvazaŭ industri-skale, kio tradukiĝis en grandegan nombron da pereintoj. Inter alie en ĉi tiu regiono estis dum kvar jaroj kruela batalkampoj de okcidentaj aliancanoj kontraŭ germana antagonisto.



En oktobro 1914, post kiam estis malsukcesinta la plano por konkeri Parizon, ambaŭ armeoj move interbatalis direkte al la Norda Maro. Celo de la germanoj estis atingi la francajn markolajn haven-urbojn, per kiuj la britoj alportis siajn taĉmentojn.

La duoncirklo de altaĵoj ĉirkaŭ Ieper estis la lasta strategia obstaklo, kiu baris la vojon al tiuj haven-urboj. Nur per la plej granda peno britoj kaj francoj povis rezisti al germana superforto. Tiu, t.n. unua Ieper-batalo de oktobro 1914 dum kiu pereis amaso da soldatoj da precipe britaj soldatoj faris, ke Ieper iĝis 'sankta' tereno por la britoj, kiel Verdun estos por la francoj. Ekde tiam ankaŭ ĉi tie stagnis la milito. Dum kvar jaroj neniu partio sukcesis trarompi la liniojn de la alia, kiajn ajn rimedojn kaj homfortojn oni (for)uzis.

Intertempe, en oktobro 1914, alia alo de la germana armeo atingis pli norde la Izero-

fluo. Ĝus kiam germanoj estis okupontaj la okcidentan bordon de la fluo, belgio sukcesis inundi ĝin. Tiu inundo blokis dum la resto de la milito la tiean trarompon de la germanoj.

La prezo de la kvarjara milito ne nur estis altega laŭ nombro de homaj vivoj, sed ankaŭ postlasis la regionon tute detruita. Nun ankoraŭ troveblas tie pli ol ducent milittombejoj kaj aliaj monumentoj dissemataj tra la pejzaĝo.

La Unua Milito estis divers-terene ĉarnira en la historio. Por la flandroj, kiuj en tiu periodo ankoraŭ estis duarangaj civitanoj en Belgio, la Unua Mondmilito signifis la naskiĝon de tutflandra naciisma movado. La Izerturo [Izertoren], konstruita kelkajn jarojn poste, iĝis la simbolo de flandra emancipiĝo. Nuntempe ĝi samtempe estas monumento de paco kaj toleremo.



Ni vizitis plurajn milit-tombejojn en tiu loko laŭ divers-naciaj soldatoj. La germanan milit-tombejon Vladsko, la britan milit-tombejon Tyne Cot. En la turo funkcia, kiel muzeo eblis vidi la evoluon de la milito kaj de la teruro, de supra etaĝo al la malsupra. En la vespero okazis milita parado en la urbo memore al tiuj tragi-gaj eventoj



Kio restas de la vivo?
Kio restas de la lando?
Que reste-t-il de la vie?
Que reste-t-il du pays?

Antverpeno



La vizito al Antverpeno komenciĝis per la modernigita stacidomo, kiu aspektas giganta kun moderna konceptado, kiu opor-tune montras kaj la belecon de la malnov-stila stacidomo.

Nuntempe Antverpeno estas la plej grava urbo de Flandrio. Ĝia marhaveno estas la dua plej granda de Eŭropo. Ĝi metis la bazon de floranta industria/kemia aktiveco kaj havigas ekonomian bonfarton al tuta Flandrio. Ke la urbo estas monda diamanto-centro ankaŭ liĝigas al ĝia haveno.

Antverpeno estas ankaŭ nodo de trafikvojoj. La renovigita Centra Stacidomo estas ekzemplo de harmonia unuigo de heredaĵa ĉarmo kaj nuntempa efikeco.

La plur-etaĝa MAS-muzeo pri etnografio, antropologio kaj pri marraj aferoj estas ege interesa kaj samokaze donas la eblecon ĝui agrablan panoramon al la urbo. La tag- kaj vespermanĝoj okazis en la sidejo de FEL (Flandra Esperanto-Ligo), kie la ekskursantoj estis bone akceptitaj kun abundaj manĝoj. La tuto finiĝis per gustumado de ĉokoladoj



Ankaŭ eblis tie viziti la libro-servon de FEL.





En la posta tago estis planita vizito al la ĉefurbo de Belgio Bruselo. Matene per aŭtobuso ni vidis la ĉefajn vidindaĵojn de la urbo. La atomiumo bele montras sian elegantecon. En la posttamezo ni trairis piede la kvatalojn, vizitis la ĉokoladan muzeon. Tie ni ricevis interesajn klarigojn pri la fabrikado de ĉokoladoj, pralinoj por finfine povi ili gustumadi.

Eblis vidi sur la kelkaj facadoj la famajn desegnaĵojn el la bildrakontoj de Tinĉjo. Ankaŭ ni nepre deziris vidi la faman pisuleton de Bruselo.

Finfine ni atingis la restoracion por la vesper-manĝo kun bongusta belga biero.

Bruselo, ĉefurbo de Belgio, fakta ĉefurbo de Eŭropo.


Post la apartigo de la Malaltaj Landoj inter protestanta nordo kaj katolika sudo, Bruselo ankoraŭ plifortigis sian pozicion. Je la ekesto de Belgio en 1830 estis do tute memkompreneble, ke Bruselo iĝis ĉefurbo de la lando. En la 19a jarcento la loĝantaro konsiderinde kreskis pro la industria revolucio tiel, ke la urbo bezonis ekspansii. La vilaĝoj, kiuj ĉirkaŭis ĝin iĝis parto de la urba teksaĵo. Grandaj laboroj, i.a. komisiitaj de reĝo Leopoldo la Dua faris el ĝi Eŭropan metropolon. Krome atestas la multnombraj konstruaĵoj en Novarta pri la iompost-ioma alranda plivastiĝo de la urbo. La Eŭropaj Institucioj sursceniĝis en la dua duono de la pasinta jarcento. Tiu ĉeesto kaj la enmigradaj ondoj el la Mediteraneaj landoj grave kontribuis al la nuna kosmopolita karaktero de la urbo. La diversaj influoj havigas al la urbo unikan kosmopolitan etoson. La brusela dialekto estas unika miksaĵo de flandraj/francaj elementoj, Bruselo estas vera reprezentanto de Belgio kaj Eŭropo.

En la posta mateno ni reveturis al Lillo por la definitiva dissiĝo.

Ni agrable ĝuis tiujn postkongresajn tagojn tra Flandrio kaj dankis al la organizantoj.



Raporto kaj fotoj de Andreo

Espéranto France-Est		Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	Provizore por ĉi-tiu numero Edmond Ludwig kaj André Grossmann	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit Texte envoyé par courriel Document avec mise en page	un mois 3 semaines 2 semaines
avant la fin de chaque trimestre		
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Vic-sekretario <i>Secrétaire adjoint</i>	S-ino Catherine KREMER 20, Voie Sacrée 55100 VERDUN	03.29.85.05.09 03.02.13.01.32	catherine2.kremer@laposte.net
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag08@free.fr por pezaj dokumentoj prefere al andreo.ag09@gmail.com
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.efe@wanadoo.fr
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
Asseseurs	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.95.55	michelinelcolnot@orange.fr
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
	S-ro Jacques PINEDA	03.89.42.88.54	ginettepineda@numericable.fr
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	simone.kiry@gmail.com
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Madette AST	03 87 01 32 85 06 70 94 11 84	madette20@hotmail.fr
	S-ro Bertrand WICK	03.89.69.86.42	bertrand.wick@orange.fr
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr
S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello@laposte.net	

Abono al La Informilo →	15 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est		← Paiement par chèque au nom de
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY		← Paiement par virement au compte
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

1. Mondial d'espéranto à Lille	15. Libro-servo
2. Renkontiĝo Alkmaro	16. Staĝo en Pforzheim
3. Postkongreso en Belgio	17. Staĝo en Pforzheim
4. Postkongreso en Belgio	18. Novaĵoj kaj informoj
5. Postkongreso en Belgio	19. Ni lernu per distraĵoj
6. Postkongreso en Belgio	20. Abonoj kaj kotizoj
7. Komitatanoj kaj menuo	21. UK en Lillo
8. Angulo de la prezidanto	22. UK en Lillo
9. Andreï KOROBENIKOV	23. Amika tago
10. Nova urbo	24. Amika tago
11. Nova urbo	25. ILEI-konferencoj en Belgio
12. Fabelo pri IF	26. Vojaĝo tra Irano
13. Fabelo pri IF	27. Vojaĝo tra Irano
14. Libro-servo	28. Nia fototeko el Lillo

ISSN 0291 6037 trimestriel
N° CPPAP : 0409 G 83517
bulletin d'information bilingue sur l'espéranto
édité par l'association culturelle
Espéranto France-Est
MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République
54000 NANCY
Directeur de la publication : **Edmond LUDWIG**
Rédacteur provisoire : André Grossmann
Dépôt légal : **30 septembre 2013**
Imprimé par *l'imprimerie Sprenger*

Angulo de la prezidanto

Karaj gesamideanoj,



Multnombre vi partoprenis en la 100-a UK en Lille. Certe vi ne bedaŭris ĉi partoprenon. Por iuj inter vi tio estis la unua UK, por aliaj unu inter pluraj, kaj por kelkaj jam malfacilas nombri ilin.

Certe ĉi partopreno donis aŭ redonis al vi emon al reklamado, agado kaj instruado. Ek al sukcesa agadjaro!

E. L.

Noto: Ke Esperanto plene taŭgas por interkompreniĝo inter homoj diverslingvaj, tion vi konstatas mem, ĉiufoje kiam vi uzas la lingvon. Sed Zamenhof certe ankaŭ konis la sekvan instruon pri ankoraŭ pli profunda interkompreniĝo laŭ la spirito de la parolado en Bulonjo.

Pri bona interkompreniĝo

Iam iu rabeno pridemandis siajn disĉiplojn:

“Kiel determini la momenton, kiam la nokto finiĝas kaj la tago komenciĝas?”

Levi diris: “Eble temas pri la momento, kiam eblas distingi kapron de safo?”

La rabeno nee skuis la kapon.

Isaak opiniis: “Ĉu kiam de malproksime eblas distingi

daktilarbon de figarbo?”

Denove la rabeno nee kapskuis.

Tiam Salomono demandis: “Diru! Kiam do?”

La rabeno respondis: “Temas pri la momento, kiam vi rigardas la vizaĝon de homo kaj vi rekonas en ĝi vian fratinnon aŭ vian fraton! Tiom longe kiom vi tion ne malkovras, pluas la nokto!”

Noto: Tre versajne Zamenhof konis tian enigmon

Forpasis nia amiko Eugène Wermelinger

Kun doloro ni eksciis pri la forpaso de Eugène Wermelinger la 11an de Aŭgusto 2015.

Li loĝis kaj laboris en Buhl, sed post emeritiĝo li ekloĝis en eta vilaĝo Les Bordes apud Liernais en Burgonjo.

Eugène Wermelinger naskiĝis en Colmar en 1941. Kiel filo de biskvitisto, li studis komercon kaj teknikon en Guebwiller, Colmar kaj Parizo. Poste li aktivis dum 40 jaroj en nutraĵo-industrio kaj eĉ kreis plurajn entreprenojn. Tio helpis al li kompreni la problemon pri la vivanteco de la nutraĵoj. Li fondis la Internacian Centron pri Serĉado kaj Dokumentado pri la vivanteco de la nutraĵo en Strasburgo (CIRDAV). Kontaktoj kun sciencistoj francaj kaj internaciaj inspiris lin por verki la libron “Lettres géniales” (Geniaj leteroj). Tiu libro verkita en la franca lingvo, aliras diversajn temojn, pri filozofio, nutraĵoj kaj ties problemoj, pri energio kaj tie li donas plurajn konsilojn. Ĝi mencias eĉ Esperanton kaj gastigadon de japana samideano.


Eugène estis ankaŭ aktiva esperantisto, gvidis kursojn en Guebwiller kaj eĉ kreis sian proponan metodon. Li partoprenis en la Esperanto-movado kaj prelegis okaze de staĝoj kaj kongresoj. Li estis eĉ amiko de la esperantisto Franz Jonas, eksa prezidento de Aŭstrio.

Samtempe li estis tre valora amiko, kiu kapablis kompreni la homojn kaj transdoni utilajn amikajn konsilojn. Li estis gastema kaj bonhumora, ŝatis ludi per la lingvoj, per la vortoj por iel kontentigi ĉiujn. Jen kiel ekzemplo, kion li skribis pri sia libro “Géni, raconte moi, petit alsacien!” (sen tradukoj).

Samtempe li estis tre valora amiko, kiu kapablis kompreni la homojn kaj transdoni utilajn amikajn konsilojn. Li estis gastema kaj bonhumora, ŝatis ludi per la lingvoj, per la vortoj por iel kontentigi ĉiujn. Jen kiel ekzemplo, kion li skribis pri sia libro “Géni, raconte moi, petit alsacien!” (sen tradukoj).

Géni nous raconte l'histoire de son village, Buhl, aussi appelé le village heureux dans les années de l'après-guerre.

"Elevé au Kougelpopf, abreuvé au Traminer, je vous invite à ma table. Alsaciens 'namma Platz', Bourguignons 'cheurtez-vous', et pour les autres on se pousse. A vos couteaux les suisses; goûtez une fois les belges; braves québécois oyez ! oyez ! Cet accroche-coeur en apéririf. Au menu de la France contée, voilà des crudités de souvenirs en entrée, un plat d'expériences en résistance, un joyeux carafon d'humour, un dessert de méditation. Bon, un petit noir, parce que tout n'est pas rose, et deux fines d'esprit, marc de Gewürz et marc de Bourgogne, il faut bien marcher sur les deux jambes. Six douzaines d'illustrations en amuse-gueule. G'Sundheit, santé, in vino veritas, je via sano samideano ! votre (bon) Géni."



Le jeune pianiste russe Andreï KOROBÉINIKOV, excellent espérantophone, en concert lors du 100e Mondial de l'Espéranto à Lille (Juillet 2015).

Né à Moscou en 1986, ce jeune pianiste se produit dans plus de 20 pays et remporte plus de 20 concours nationaux et internationaux. Nous retiendrons notamment le concours international Scriabine en 2004, ainsi que celui de Rachmaninov de Los Angeles en 2005 pour lequel il reçoit également le Prix du public. Il sort du Conservatoire de Moscou à seulement 19 ans avec la distinction spéciale du « Meilleur musicien de la décennie ». En 2005, Andreï Korobeinikov poursuit ses études au London Royal College of Music, grâce à une bourse de G. & J. Simmonds Scholarship.



Il est aujourd'hui régulièrement invité à travers le monde et se produit avec de prestigieuses formations telles que Philharmonique de St Petersburg, Tchaikovsky Symphony Orchestra of Moscow, Moscow City Symphony « Russian Philharmonic », Philharmonia Orchestra, Konzerthausorchester Berlin, NHK Symphony Orchestra, NDR Sinfonierorchester Hamburg, Budapest Festival Orchestra, Orchestre National de France, Orchestre de Chambre de Paris, Orchestre de Bordeaux, Lahti Symphony Orchestra... sous la direction de Yuri Temirkanov, Ivan Fisher, Vladimir Fedoseyev, Vladimir Ashkenazy, Okko Kamu, Antoni Wit, Alain Altinoglu...

Parallèlement, Andreï Korobeinikov se produit en récital et en musique de chambre avec des musiciens de renom tels que Vadim Repin, Alexandre Kniazev, Henri Demarquette et Dmitri Makhtin, dans les plus prestigieuses salles et festivals : Théâtre des Champs Elysées, Festival Radio France de Montpellier, Festival International de Piano de La Roque d'Anthéron, Festival de la Folle Journée de Nantes et Tokyo, Auditorium du Louvre, Wigmore Hall de Londres, Festival de Gstaadt, Conservatoire de Moscou, Washington Performing Arts Center, Tokyo Suntory Hall, Philharmonie de Saint-Petersbourg, Konzerthaus de Berlin, Tonhalle de Zurich... En 2013, le pianiste a fait une tournée triomphale aux Etats-Unis et en Russie avec et sur invitation de Vadim Repin.

En outre, son talent exceptionnel s'exprime dans plusieurs domaines. À 17 ans, il obtient un diplôme d'avocat de l'Université Européenne de droit de Moscou avec les félicitations du jury et publie plusieurs ouvrages juridiques, notamment sur le droit de la propriété intellectuelle. Ces dernières années, il a développé une vraie passion pour la composition et a présenté ses œuvres dans plusieurs de ses récitals.

Andreï korobeinikov enregistre pour Mirare. En 2008, son premier disque consacré à Scriabine remporte un très grand succès et est distingué par la presse spécialisée (*Diapason Découverte / Diapason d'Or de l'Année / Choc* de Classica). Un disque dédié aux *Sonates* et *Bagatelles* de Beethoven est également sorti, puis, le pianiste enregistre les *Préludes op.34* et les deux *Concertos pour piano* de Chostakovich avec l'Orchestre Symphonique de Lahti/Okko Kamu. Son interprétation sera acclamée (Diapason d'or...). Pour le prochain CD, Andreï Korobeinikov revient à son exploration du répertoire de Scriabine avec l'intégrale des Etudes, enregistrées au Bayerisch Rundfunk, et encensé par la critique internationale.

Ses futurs engagements comportent, entre autres, une tournée avec St Petersburg Philharmonic Orchestra/Yuri Temirkanov, des concerts avec Budapest Philharmonic Orchestra/Pinchas Steinberg, Ural Philharmonic Orchestra/Dmitri Liss, Tchaikovsky Symphony Orchestra of Moscow/Vladimir Fedoseyev, NHK Philharmonic Orchestra/Vladimir Fedoseyev, des recitals à travers le monde (Paris Théâtre des Champs-Elysées, Taipei National Concert Hall...) et deux tournées (Japon et Canada) avec le violoniste Vadim Repin.

Dum unu el multaj E-aranĝoj organizitaj en Bydgoszcz (urbo en norda Pollando, tre konata inter esperantistoj) mi aŭdis s-ron Albin Makowski paroli pri siaj spertoj en germana koncentrejo. En periodo de la dua mondmilito, centmiloj devis trairi pordegojn de tiuj "morto-fabrikoj" kaj tie aŭ aliloke estis mortigitaj 6 milionoj da polaj civitanoj. Tio signifas ke ĉiu familio perdis iun dum la germana okupado inter la jaroj 1939 kaj 1945. La travivintoj de la 2a mondmilito ofte atestis pri la germanaj kruelaĵoj. Pro tio la partoprenantoj de tiu E-kluba vespero ne estis tre surprizitaj de lia prelego, ĝis la momento, kiam ... s-ro Makowski montris E-lernolibreton, kiun li verkis en koncentrejo. Tio kaŭzis veran ŝokon.

Esperanto en koncentrejo (parto 1)

Ankaŭ mi partoprenis tiun renkontiĝon kaj en mia konscio naskiĝis tuj klara imperativo: fikse dokumenti tiun eksterordinaran eventon. Ja tio estis verŝajne unusola okazintaĵo en la historio de E-movado! La "lernolibro" estis fakte nur modesta notkajero kun simplaj lecionoj kaj vortareto, kiujn la aŭtoro uzis por sekrete instrui Esperanton al aliaj kunsortanoj. Kiam s-no Makowski finis sian prelegon, mi petis lin, ke ni renkontiĝu denove, ĉar mi deziras verki artikolon por la E-gazetaro. Dum tiu sekva vizito ni havos pli da tempo por interparoli, do mi trankvile trarigardos la dokumentojn kaj objektojn, kiujn li elportis el Stutthof-koncentrejo.

Antaŭ ol Germanujo invadis Pollandon, la sekreta germana polico "Gestapo" havis jam listojn de la homoj, kiuj aktivis socie kaj avertadis pri la proksimiĝanta milito. Tiujn informojn ili ricevis de la germanoj loĝantaj en Pollando, kiuj observis kion faras kaj pri kio parolas iliaj najbaroj. Por tiuj "malamikoj de Germanujo" estis preparitaj malliberejoj kaj – ĉe la bordo de Balta Maro, sudoriente de Gdansk – la unua koncentrejo de Stutthof. Al ĝi estis senditaj polaj arestitoj, tuj post la germana agreso kontraŭ Pollando (okazinta la 1-an de septembro 1939).



La okupanto enkondukis la "novan leĝon" laŭ kiu aktivaj intelektuloj (instruistoj, pastroj, ĵurnalistoj, kulturgvidantoj, artistoj) devas esti arestitaj kaj fincele likviditaj. Inter ili estis ankaŭ Albin Makowski – ja esperantistoj ankaŭ estis nomitaj "danĝera socielemento". Li eklernis Esperanton el E-lernolibro ricevita la 23an de aŭgusto 1928, okaze de sia naskiĝfesto. Tio estis la donaco de lia amiko Jozefo Osowicki, kiu skribis sur la titolpaĝo: "*En ĉi tiu mondo, nenio bona kaj nobla atingebblas sen longaj penado kaj doloro*" (citaĵo de poeto Z.Krasinski). Okaze de via naskiĝfesto donacas tion al vi amike – Jozefo.

Lerninte la novan lingvon, juna Albin kun siaj amikoj organizis E-rondon en gimnazio kaj poste, al "Gazeta Pomorska" (Pomerania Gazeto), li sendadis artikolojn pri la kunvenoj, same kiel novaĵojn pri ekstelanda E-movado k.t.p. Tiel Esperanto fariĝis grava parto en lia vivo kaj la kluba laboro prosperis. Novembre 1933 Makowski ricevis postenon de respondeca redaktoro en "GP" kie aperadis artikoloj pri la rapide armiganta sin Germanujo. En tiu jaro Hitler, post demokrata elekto, estis nomumita kanceliero de Germanujo kaj baldaŭ oficiale deklaris la "ĉiam aktualan" *Drang nach Osten* (prus-germana agrespreso orienten). Tia estis ja tradicia germana politiko kun sia *Neurdnung* (nova ordo por "Mitteleuropa" /Mez-Europo). La estonteco montris, ke la avertoj en "Pomerania Gazeto" ne vanis: la 2a mondmilito ekflamis la 1-an de septembro 1939 per furioza agreso de germanaj armeoj kontraŭ Pollando. El tero kiun trapaŝis la okupanto, elŝprucis sangoriveroj, ekregis amasa teroro kaj ĉiu kultura akvitado devis tuj ĉesi. Alvenis la nigra nokto de historio sed, spite al teroro, la homoj provis vivi normale. Ankaŭ s-no Makowski, kiu decidis edziĝi en 1941. Bedaŭrinde, familia feliĉo ne estis al li destinita, ĉar baldaŭ la germana polico lin arestis, post kruela batado ĵetis al obskura kelo kaj poste veturigis lin al Stutthof-koncentrejo.

Infervjuo kun numero "P-23407"

Demando (D): S-no Makowski, la informo ke vi provis agadi por Esperanto en nazia koncentrejo sonis al mi preskaŭ nekredibla. Jen ĉiupaŝe minacas morto, kiu kolektas abundegan rikolton, la kaptitoj pro malsato kaj malsanoj aspektas kiel vivaj skeletoj... Kial en tia malesperiga realeco vi okupiĝis pri Esperanto?

Respondo (R): Jes, tiel aspektis vivo de la koncentrejanoj. La nomo ne plu gravis, ĉar la kaptitoj fariĝis nur numeroj. Mi ricevis la numeron "P 23407". Ne eblas priskribi kiel kruelan sorton povas fari homo al homo. Tie mi reale ekvidis abismon de la homa tragedio. La koncentrejo troviĝas en la regiono tranĉita per multaj akvokanaloj, tre malfacila por eskapi. Laŭ duoblaj bariloj de elektraj pikdratoj, staris gardoturoj kaj la tuton patrolis pafpretaj ĝendarmoj kun hundegoj, speciale dresitaj por vundigi morde la kaptitojn.

Tiujn malsanajn aŭ nesufiĉe fortajn por laboregi, ili grupe mortigis en **gas-kamero** kaj poste bruligis en speciale konstruitaj kadavrobluligejoj. Kiu ne travivis tian inferon persone, ne kapablos kompreni faton de la kaptitoj en nazia koncentrejo. Mi memoras, ke post mia aresto, kiam min atendis pridemandado kun torturoj, mi volis forigi timon kaj atingi internan pacon. Fide al Dia providenco, mi komencis preĝi la rozaron en kelkaj lingvoj: pola, latina, greka kaj en Esperanto.



Gas-kamero en Stutthof-koncentrejo



Gas-kamero interne



Malplenaj ladskatoloj, post uzita venena gaso "Ziklon B". Trovis ilin soldatoj libergintaj koncentrejon.

D: Vi pensas ke Esperanto helpis tie vin travivi?

En tia situacio la sinprotektiva viv-instinkto sufloris, ke spite al ĉio ni devas trovi iun savmanieron kontraŭ psika degenero kaj bestigo – tiu plej danĝera koncentreja malsano. Pro tio, necesis disigi la pensojn el la psikrompiga kruelo, malespera ĉiutageco, minaca ĉiuhore morto. Okupiĝo de la menso per io valora kaj kultura aktivado instigis la kaptitojn al kunlaboro, devigis ilin akcepti aktivan sintenon, kiu plilfortigus ilin psike kaj donus la eblecon travivi. Por mi, tia ŝanco estis Esperanto.

D: Sed ĉiu lingvo funkcias nur kiam uzata en komunikado. Ankaŭ por uzi Esperanton vi bezonis ja kontakton kun aliaj homoj. Ĉu tio estis la motivo, ke vi decidis instrui ĝin al viaj proksimaj kunsortuloj?

R: Por ke la bildo estu kompleta, oni sciis ke krom nia E-grupeto, inter la kaptitoj ekzistis ankaŭ aliaj sekretaj formoj de kultura aktivado. Sentiĝis tie granda soifo al literaturo. De mano al mano ĉirkaŭis fragmentitaj poparte libroj de Mickiewicz, Conrad, Sienkiewicz, Wells, Tolstoj... Aŭtune 1943, dum teraj foslaboroj mi interparolis kun d-ro L. Duszyński. Li flue parolis kelkajn lingvojn, do ni trovis komunan temon. Li precipe interesiĝis, kiam mi menciis pri la facila kaj neŭtrala Internacia Lingvo. Ni faris eksperimenton: li parolis al mi hispane kaj mi – en Esperanto. La rezulto estis surpriza, ĉar la du lingvoj tiel similis, ke ni povis parte interkompreni unu la alian. Pri niaj fremdlingvaj interparoloj ekinteresiĝis pli kaj pli da kaptitoj. Responde al tia reago, en vintro 1943-1944 mi komencis fari sekretajn prelegojn pri Esperanto. Sekve kelkdek personoj emis ĝin lerni sed mi timis, ke nia agado ne tro disvastiĝu, ĉar tio nepre finiĝus tragedie. Ni estis ja kaptitoj en la koncentrejo, kie ĉiu kultura agado estis malpermesita kaj kruele punata.

D: Kiel do vi sukcesis skribi E-lecionojn?

R: Laŭ paso de monatoj en 1944, la germanaj armeoj komencis malvenkadi sur ĉiuj frontoj kaj tiuj informoj naskis novan esperon inter la kaptitoj. Printempe, en maldika notkajero, mi komencis kaŝe verki E-libreton kaj el memoro priskribi la gramatikon de nia lingvo. Tiam komenciĝis niaj unikaj lecionoj. La grupeto de E-adeptoj renkontiĝis en la barako, post mizera vespermanĝo. Ankaŭ dum laboro ni provis mallaŭte paroli en Esperanto. Ravis nin simpleco kaj melodio de la Internacia Lingvo. Fine de tiu jaro, kiam eĉ la koncentrejaj gardistoj konsciiĝis pri la baldaŭa kolapso de hitleraj armeoj, vigliĝis ankaŭ la kulturaj aktivecoj. Pastroj vespere kaj frumatene aranĝadis sekrete komunajn preĝojn, dimanĉe - la Mesojn (ankaŭ tiun en la antaŭkristnaska nokto). Multaj homoj, fronte al ĉiam proksima morto, decidis partopreni konfesojn kaj akcepti sanktan Komunian. Al ili, tiuj religiaj praktikoj estis tre grava morala kaj psika apogo.

D: Ĉu vi ankoraŭ memoras la homojn, kiuj partoprenis en tiuj lecionoj?

R: Multaj nomoj forflugis el mia memoro, sed kelkajn amikojn mi memoras: W. Rac – kuracisto, J. Dunajski – bankoficisto, M. Kaluta – instruisto, d-ro Duszyński, fratoj Poroszyński. Foje venadis aliaj kaptitoj, kiel prof. Jugurtis – eksa litova ministro kaj pastro Lipunas, kiu konis tre bone kelkajn lingvojn.

D: Enirinte la pordegon de Stutthof, vi renkontis kaptitojn el diversaj nacioj, ĉu ne?

R: Jes, krom poloj estis tie rusoj, ĉeĥoj, italoj, danoj, latvoj, litovoj kaj, ekde jaro 1942, oni komencis alveturigi ankaŭ judojn. Dum laboro, same kiel en la barakoj, estis miksita diversnaciaj grupoj. Regis ĉie ankaŭ "internacia lingvo" – la germana, en kiu oni anoncatis ĉiujn informojn kaj ordonojn. Ho, ve al bedaŭrindulo, kiu tion ne deĉifris: la vipo aŭ bastono tuj enkapigis la "vort-trezoron".

Fabelo pri Internacia Festivalo de Anna Striganova

Finiĝis la serio de Internaciaj Festivaloj (IF) organizitaj de HDP (Hans-Dieter Platz). Tamen jen interesa priskribo de okazinta IF en Nördlingen kun la poezia kaj fabela stilo de Anna Striganova. Ĝi estas vere leginda por plezurigi la koron kaj la animon. Anna estas ankaŭ artistino, kiu kreas siajn proprajn fabelajn pupetojn en tute fabela fantazio, ankaŭ ĝuu ilin.



Tiel do okazis - tiu ĉi festivalo evedentiĝis pli silenta, pli malrapida, pli profunda. Profundiĝinta en la festan, sorĉan sonĝon. Iom malpli sidante ĝis la mateno, iom malpli dancante dum la novjara balo, ni sukcesis multe pli kutimiĝi unu al la alia kaj al nia brilanta per rufaj fenestroj gastama domo. Do, dum la dua tago alvenis ĉiuj-ĉiuj-ĉiuj, kaj la domo pleniĝis de la paroloj kaj bruoj. En la manĝejo agrable ekodorus freŝkuirita manĝaĵo, ekludis gitaroj, en la aeron supreniĝis aromo de la vingrogo kaj la festivalo komenciĝis, komenciĝis nia vintra fabelo. Liba alportis al ni sian bonegan bakaĵon, kiun mi, verdire, la tutan jaron rememoris kun la granda kareso. Kaj iom malpli proksime, en la centro de la urbo, ĉiun horon sonoris la sonorilo sur la turo de sankta Danielo. Unu, du, tri, komenciĝas la festo, kvar, kvin, ses...

Kaj komenciĝis la festaj tagoj. Promenoj laŭ Nördlingen, vadoj laŭ la urba muro, kiun la tutan laŭ la rondo eblas ĉir-

kaŭiri dum nur duonhoro; vizito de la turo de sankta Danielo, tia alta, ke de ĝi la tuta urbo estas videbla, tegolaj tegmentoj laŭ kiuj jam multajn jarcentojn vagadas la herooj de la plej bonaj fabeloj, taĉmentoj de la kolomboj, kiuj transflugas de la domo al domo, kaj eĉ la reloj laŭ kiuj rampas malgrandaj, trivagonaj, ruĝaj elektrotrajnetoj. Estis ankaŭ la programeroj, kie preskaŭ ĉiu el ni sukcesis rakonti pri tio, pri kio revis rakonti la tutan jaron. Iu ĝuste sekvis la temon de la festivalo - "Lingvoj", rakontante pri siaj aŭ simple ŝatataj lingvoj kaj kulturoj. Iu fidela al la amataj temoj, rakontis pri la propra, nur iom ŝanĝinte la titolojn: "Lingvo de la steloj" aŭ "Lingvo de la fabeloj". Kaj por mi ĉiam pli ol ĉio plaĉas tiuj prezentadoj, dum kiuj homoj rakontas pri tio, kio dum tiu ĉi jaro ili faris mem: tio povas esti nova kanto, verkita aŭ tradukita libro, aŭ kreita retejo. Plenaj de la fiero kaj amo pri sia nova kreaĵo, tiuj ĉi prezentadoj evidentiĝas la plej vivaj, kaj la kreaĵoj, kiujn oni dum ili prezentas iĝas novjaraj donacoj pro ni ĉiuj. Pli ol ĉio min tuŝis prezentado de la retejo pri la proverboj en Esperanto, kiun faris kun zorgemo kaj amo, kaj pli grave kun la bonega kapablo - de Rob. Ankaŭ plaĉis prezentado de Mikaelo pri la libroj de rusaj sciencfikciaj verkistoj fratoj Strugackij, kies librojn li tradukis kaj pri kiuj eĉ verkis kelkajn kantojn.

Poste venadis la vespero kaj promenoj kaj prezentadoj ŝanĝadis per la koncertoj, kaj la koncertoj ŝanĝiĝis per la "Knajpumado", kiuj kun ĉiu nova tago iĝis pli kaj pli hejmecaj, kaj por tiuj, kiuj ankoraŭ ne tro laciĝis, ludis la gitaroj, foje ĝis la mateno. Ĝuste dum tiuj ĉi minutoj homoj kutimiĝis unu al la alia pli ol kutime, komunikis pli varme kaj amikece.

Dum unu el la festaj tagoj ni vojaĝis por ekskursi al Munkeno, sed granda, tute vera urbo ne povis mirigi nek per la festaj vitrinoj, nek per la grandaj katedraloj, post kelkaj tagoj de loĝado en la urbeto vere fabela. Tamen la celo de la ekskurso estis ne mirigi nin, sed konduki al la grandega, la plej granda en la mondo bierejo, ene simila al la solena salono de kavalira Kameloto, nur tie ne estis rondaj tabloj.

Kulmino de la Festivalo, kiel necesas, estis novjara balo, dum kiu pli ol ĉio en la mondo al mi plaĉas tio, ke la nova jaro ĉe ĉiuj ĉeestantoj komenciĝas dum sia horo kaj eĉ guto de la imago sufiĉas por imagi, kiel ĝi, grandega, stelplena, neĝa flugas de la oriento al la okcidento, deŝirante de la universo ŝirmon de la tempo, enlasante al la tero ĉion novan kaj forportante tion, kio senrevene foriris. Kaj ĉiun tagon mallaŭtiĝas por la minuto la muziko, haltas la balo, malfermiĝas la ĉampano, kaj komenciĝas la kalkulado. Tri, du, unu kaj jen por iu ankoraŭ komenciĝis la nova jaro kaj denove laŭ la rondo - ĉampano, brakumoj, gratuloj, kaj la nova jaro flugas pli for kaj pli for, ĉirkaŭinte per si jam preskaŭ la tutan nian etan, helbluan planedon.

Sed la plej grava en ajna renkonto ĉiam estis kaj ĉiam restos la homoj. Ĝuste per la iliaj ridetoj, per la iliaj kantoj, per iliaj rakontoj pleniĝas la festo, per ilia ĝojo pleniĝas kaj ekvivas la domo. Ĝuste ili, tiaj diversaj, ĉiuj laŭ si strangaj, laŭ si seriozaj, laŭ si ridindaj, kaj kompreneble talentaj, kreas la feston. Kaj ĝuste kun ili estas tion netolereble adiaŭi, kiam la festo finiĝas.

Tiel do okazis - tiu ĉi festivalo evedentiĝis pli silenta, pli malrapida, pli profunda. Profundiĝinta en la festan, sorĉan sonĝon. Iom malpli sidante ĝis la mateno, iom malpli dancante dum la novjara balo, ni sukcesis multe pli kutimiĝi unu al la alia kaj al nia brilanta per rufaj fenestroj gastama domo.



Do, dum la dua tago alvenis ĉiuj-ĉiuj-ĉiuj, kaj la domo pleniĝis de la paroloj kaj bruo. En la manĝejo agrable ekodoris freŝkuirita manĝaĵo, ekludis gitaroj, en la aeron supreniĝis aromo de la vingrogo kaj la festivalo komenciĝis, komenĉiĝis nia vintra fabelo. Liba alportis al ni sian bonegan bakajon, kiun mi, verdire, la tutan jaron rememoris kun la granda kareso. Kaj iom malpli proksime, en la centro de la urbo, ĉiun horon sonoris la sonorilo sur la turo de sankta Danielo. Unu, du, tri, komenciĝas la festo, kvar, kvin, ses...

Kaj komenciĝis la festaj tagoj. Promenoj laŭ Nördlingen, vagadoj laŭ la urba muro, kiun la tutan laŭ la rondo eblas ĉirkaŭiri dum nur duonhoro; vizito de la turo de sankta Danielo, tia alta, ke de ĝi la tuta urbo estas videbla, tegolaj tegmentoj laŭ kiuj jam multajn jarcentojn vagadas la herooj de la plej bonaj fabeloj, taĉmentoj de la kolomboj, kiuj transflugas de la domo al domo, kaj eĉ la reloj laŭ kiuj rampas malgrandaj, trivagonaj, ruĝaj elektrotrajnetoj. Estis ankaŭ la programeroj, kie preskaŭ ĉiu el ni sukcesis rakonti pri tio, pri kio revis rakonti la tutan jaron. Iu ĝuste sekvis la temon de la festivalo - "Lingvoj", rakontante pri siaj aŭ simple ŝatataj lingvoj kaj kulturoj. Iu fidela al la amataj temoj, rakontis pri la propra, nur iom ŝanĝinte la titolojn: "Lingvo de la steloj" aŭ "Lingvo de la fabeloj". Kaj por mi ĉiam pli ol ĉio plaĉas tiuj prezentadoj, dum kiuj homoj rakontas pri tio, kio dum tiu ĉi jaro ili faris mem: tio povas esti nova kanto, verkita aŭ tradukita libro, aŭ kreita retejo. Plenaj de la fiero kaj amo pri sia nova kreaĵo, tiuj ĉi prezentantoj evidentiĝas la plej vivaj, kaj la kreaĵoj, kiujn oni dum ili prezentas iĝas novjaraj donacoj pro ni ĉiuj. Pli ol ĉio min tuŝis prezentado de la retejo pri la proverboj en Esperanto, kiun faris kun zorgemo kaj amo, kaj pli grave kun la bonega kapablo - de Rob. Ankaŭ plaĉis prezentado de Mikaelo pri la libroj de rusaj sciencfikciaj verkistoj fratoj Strugackij, kies librojn li tradukis kaj pri kiuj eĉ verkis kelkajn kantojn.



Poste venadis la vespero kaj promenoj kaj prezentadoj ŝanĝadis per la koncertoj, kaj la koncertoj ŝanĝiĝis per la "Knajpumado", kiuj kun ĉiu nova tago iĝis pli kaj pli hejmecejaj, kaj por tiuj, kiuj ankoraŭ ne tro laciĝis, ludis la gitaroj, foje ĝis la mateno. Ĝuste dum tiuj ĉi minutoj homoj kutimiĝis unu al la alia pli ol kutime, komunikis pli varme kaj amikece.

Dum unu el la festaj tagoj ni vojaĝis por ekskursi al Munkeno, sed granda, tute vera urbo ne povis mirigi nek per la festaj vitrinoj, nek per la grandaj katedraloj, post kelkaj tagoj de loĝado en la urbeto vere fabela. Tamen la celo de la ekskurso estis ne mirigi nin, sed konduki al la grandega, la plej granda en la mondo bierejo, ene simila al la solena salono de kavalira Kameloto, nur tie ne estis rondaj tabloj.

Kulmino de la Festivalo, kiel necesas, estis novjara balo, dum kiu pli ol ĉio en la mondo al mi plaĉas tio, ke la nova jaro ĉe ĉiuj ĉeestantoj komenciĝas dum sia horo kaj eĉ guto de la imago sufiĉas por imagi, kiel ĝi, grandega, stelplena, neĝa flugas de la oriento al la okcidento, deŝirante de la universo ŝirmon de la tempo, enlasante al la tero ĉion novan kaj forportante tion, kio senrevene foriris. Kaj ĉiun tagon mallaŭtiĝas por la minuto la muziko, haltas la balo, malfermiĝas la ĉampano, kaj komenciĝas la kalkulado. Tri, du, unu kaj jen por iu ankoraŭ komenciĝis la nova jaro kaj denove laŭ la rondo - ĉampano, brakumoj, gratuloj, kaj la nova jaro flugas pli for kaj pli for, ĉirkaŭinte per si jam preskaŭ la tutan nian etan, helbluan planedon.

Sed la plej grava en ajna renkonto ĉiam estis kaj ĉiam restos la homoj. Ĝuste per la iliaj ridetoj, per la iliaj kantoj, per iliaj rakontoj pleniĝas la festo, per ilia ĝojo pleniĝas kaj ekvivas la domo. Ĝuste ili, tiaj diversaj, ĉiuj laŭ si strangaj, laŭ si seriozaj, laŭ si ridindaj, kaj kompreneble talentaj, kreas la feston. Kaj ĝuste kun ili estas tion netolereble adiaŭi, kiam la festo finiĝas.

Komenciĝas la lasta vespero, sonoras per la adiaŭaj kantoj, rido kaj sono de la pokaloj, kaj homoj iom post iom foriras kolekti aĵojn, por morgaŭ, dum la aŭroro, forveturi al la malproksimaj domoj, disĵetitaj laŭ la tuta mondo. Ĉiu forveturas siaspece, iu kun ŝajna senzorga rideto svingas per la mano ĉe la pordo. Iu brakumas ĉiujn forte-forte kaj ŝajnigas, ke ne ploras, tute-tute. Iu foriras, tute ne adiaŭante, kvazaŭ baldaŭ revenos, sed ne revenas. Kaj la domo iom post iom malpleniĝas.

Ĉijare ni restis en la domo ankoraŭ du tagojn. Komence ĝi ĉagrenis kune kun ni, absolute malplena, kaj poste al ĝi venis fremdaj homoj. Sed al mi pro iel ŝajnis, ke ĝi nin ne forgesos, ne forgesos nin ankaŭ la malgranda urbo, kaj la abio kaj eĉ la meteorito, kiu dormas profunde sub la tero jam multajn jarcentojn kaj multon vidis. Kaj dum la sekva jaro en la tute alia urbo, ni havos novan domon kaj novan feston, tre similan al tiu, sed tamen la alia, ja la hejmo - estas antaŭ ĉio la homoj, tiuj ĉi samaj kaj ankoraŭ kelkaj novaj kaj komenciĝos la nova jaro.

Anna Striganova (Rusio) Februaro 2011
Desegnoj: Anna Striganova Fotoj: Dmitrij Ŝevĉenko

Post IF, la nova aranĝo nomiĝas **Luimnesk' informoj ĉe: www.luminesk.de**. Ĝin organizas Andreas Diemel en la kadro de GEA. La aranĝo okazos de la 28a de decembro ĝis la 4a de januaro en Nideggen.



El nia libroservo



Informoj

La libroservo partoprenos la venontan komunan regionan staĝon en Pforzheim la 16/18ajn de oktobro 2015.

Preskaŭ ĉiuj el niaj 700 libroj kaj kasedoj atendas vin!

La listo de la libroj aĉeteblaj ĉe nia libroservo aperas en la retejo de Esperanto France Est (<http://esperanto.alsacelorraine.perso.sfr.fr>). Se iu precipe allogas vin: avertu min per retmesaĝo, mi nepre kunportos ĝin (sed vi ne estos devigata aĉeti ĝin)!

Ĝis baldaŭ !

Jean-Luc Thibias



Novaj libroj :


1



2



3



1) **Simboloj de Rusio**, kulturo, **Vladimir Opletajev**, *Impeto*, 2015, 100 paĝoj. 12 €. Ĉu vi bone konas Rusion? Se ne, jen kelkaj klarigoj pri ĝiaj simboloj: ŝtata blazono, Volgo, lago Bajkalo, Avo Frosto, rusa vodko, sputniko...

2) **Fabeloj de la mezepoko**, pri fabeloj, **Anna Striganova**, *Impeto*, 2015, 48 paĝoj. 3 € ! Ana Striganova priskribas diversajn estaĵojn, kiuj, ofte jam travivintaj la antaŭkristanajn tempojn, vigligis la fabelojn de mezepoko. Ni do iom konatiĝu kun tiuj spiritoj, kies figuroj kreitaj de Anna kortuŝe ornamas la libreton.

3) **Ho, tomboj de l' prapatroj**, romano, **Clelia Conterno Guglielminetti**, *Itis*, 2015, 176p, 18 €. Vidu la recenzon de Edmond Ludwig sur la alia paĝo

1. Vi sendas vian mendon

- per poŝto al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉi-dorsan mendilon)
- per e-poŝto al "libroservo.efe@wanadoo.fr"
- nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.

2. Vi baldaŭ ricevos viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)

3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al "libroservo 2800-76 H NANCY" (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo "libroservo" sendita al la adreso de la libroservo. Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al "LIBROSERVO"

IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97

BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo.



Resumoj, recenzoj, opinioj...de Edmond Ludwig:

KUMEWAWA *Le fils de la jungle* Tibor Sekelj

La en nia asocio bone konata samideanino Anne Jausions tradukis franclingven la rakonton *Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo* de Tibor Sekelj. Jen plia traduko al nacia lingvo, kiu kontribuas al iu iom-post-ioma paralelo esperantista de *La eta princo* de la franca aŭtoro Antoine de Saint-Exupery!

Mendu ĉe Anne Jausions Annedclojausions@aol.com **13 € + sendokostoj**

Eble venonte trovebla en la libroservo



KRIMEO ESTAS NIA Reveno de la imperio (Kalle Kniivilä) Mondial

Baldaŭ trovebla en la libroservo

Post *Homoj de Putin* la ĵurnalisto Kalle Kniivilä nin regalas per nova tre aktuala raportaĵa libro KRI-MEO ESTAS NIA. Kiel por la antaŭa libro li vizitis loĝantojn de Krimeo post la anekso fare de Rusio kaj pridemandis ilin pri iliaj starpunktoj ĉi-rilataj. Aktuale Rusion oni ne plu povas taksi demokratio, en Krimeo nuntempe danĝeras reĝimkritikaj eldiroj. Li do plej ofte ŝanĝis la nomojn de la intervjuitoj. Parto inter ili estas esperantistoj, aliaj konatoj de esperantistoj. Denove utilis la esperantisteco de la aŭtoro.

La rezulto de ĉio tio estas plej homproksima raportaĵo pri la situacio. Kiel jam *Homoj de Putino*, ĉi libro aperis unue finn- kaj svedlingve, kaj tuj poste esperantlingve. La aŭtoro cetere plej interese prezentis sian libron en la libroservo de la UK en Lille. Ke la opinioj pri la anekso de Krimeo malsimilas, mi povis konstati post interparolado kun rusiaj kongresanoj.

E.L.

HO, TOMBOJ DE'L PRAPATROJ (Clelia Conterno Guglielminetti) Eldonejo ILTIS 2015

jam trovebla en la libroservo (vidu la alian paĝon)

Ĉi originala romano ĵus aperis okaze de la centa datreveno de la naskiĝjaro (1915) de la poetino Clelia Conterno Guglielminetti. Tri gekuzoj rakontas la historion de la familio post malkovro de dokumentoj forgesitaj en kofro sub la tegmento de la domo.

Kaj jen la leganto lernas pri la vivo de burĝaj familioj ekde la dua duono de la 19-a jarcento en la norditala urbeto Novara kaj en Torino.

Enamiĝoj, geedziĝoj malhelpataj pro mono aŭ pro politika kariero, klaĉoj eturbaj disvolviĝantaj en politike interesega periodo, dum kiu revoluciaj ideoj skuas la polvecajn vivkutimojn kaj unuigita Italio kreiĝas kun la portempa landa ĉefurbo Florenco. Kaj... kaj...

Ne, ne ! Ne timu enuan kurson pri Historio ! Tamen vi lernos multon en tiu prifamilia rakonto plena je ĝojoj kaj suferoj. Kaj ĉe la fino...

Edmond LUDWIG

<i>Mendilo</i>	
Bonvolu sendi tiujn librojn:	al jena adreso:
	S-ro/ino
En	Subskribo:
la	



kaj BAVELO
Invitas al

78a regiona staĝo kaj 37-a BAVELO-Seminario 16a - 18a Oktobro 2015 en Pforzheim

En Pforzheim novaĵoj allogas.

Pforzheim – fondita en Romia tempo, grave detruita per bomb-atakoj dum la Dua Mondmilito, poste rapide kaj per (tro) multege da betono rekonstruita: Pforzheim ne estas konata kiel turisma allogaĵo, sed kiel urbo de la industrio pri oro, juveloj kaj ornamaĵoj.

Per la seminario en Pforzheim BAVELO serĉas novajn vojojn: ni forlasos la bone konatan sistemon de kursoj por komencantoj – progresantoj – parolantoj, anstataŭ tio ni proponas unu metiejon/atelieron por ĉiuj kune, por „lernantoj“ kaj ĉiuj, kiuj kuraĝas ekpaŝi survoje al instruado. Per malgrandaj grupoj, kie la roloj de instruanto kaj lernanto interŝanĝiĝas alterne. **Ekkuraĝu kaj elprovu kun ni tiun ekscitan eksperimenton.**

Pli precize: la sabata antaŭtagmezo enhavos modulojn, kiuj vere estas necesaj kaj gravaj por **ni ĉiuj**, eĉ por tiuj inter ni, kiuj neniel intencas instrui Esperanton:

Kiel mi ekkomencas interparoladon pri Esperanto? Kiel mi povas uzi la daŭron de liftveturado por doni al alia persono imagon pri mia fascino pri Esperanto?

Kiuj estas bone elprovitaj ekzemploj por montri la flekseblon kaj esprimforton de Esperanto?

Tion ĉion ni ne ekscios per aro da sekaj prelegoj, sed kontraŭe ni povas mem elprovi kaj vigle interŝanĝi proprajn spertojn.

La sabata posttagmezo antaŭvidas la elekton inter pluraj eblecoj: promonado al la tri burgoj – bestoparko kun sovaĝaj bestoj el nia regiono - muzeo pri ornamaĵoj - teknika muzeo (teknikoj de la ornamaf-farado).

Je dimanĉa mateno la instruemuloj daŭrigas la laboron en malgrandaj grupoj, dum la aliaj povas partopreni alian ekskurson, ekzemple al "panorametro" (en la eks-gasometro vi spektas 360°-bildon pri la antikva "Romo en la jaro 312").

Krome atendas vin agrabla kaj interesa vespera programo.

Akompanas vian spertiĝon: • Martin Ptasinski kaj Alois Eder: instrutrejnado • Eva Fitzelová kaj Johannes Mueller: podkasto • Sebastian Kirf, GEA-prezidanto: kunlaboraj retaj iloj de GEA • Rotraud Wetzel kaj

Johannes Mueller: kunkantu! • Inge Simon: ekskursprogramo.



ludemaj lutroj (supre) kaj junaj aproj en "strio-vesto"



Gasometro: Romo en la jaro 312



Parko apud rivero Enz

vendredo, 16a oktobro

14:30 - 17:00	frualvenintoj ekskursos al Maulbronn (monda heredaĵo)
17:00 - 18:00	alveno, aliĝo, ekloĝado en la ĉambroj, pliaj informoj
18:00 - 19:00	bonvenigo kaj vespermanĝo
19:00 - 20:00	enkonduko
ekde 20:15	vespera programo (konatiĝo, filmo) poste knajpo

sabato, 17a oktobro

07:30 - 08:30	matenmanĝo
09:00 - 11:45	kurso por ĉiuj
12:00 - 13:00	tagmanĝo
14:00 - 17:00	diversaj ekskursoj por ĉiuj
17:00 - 18:00	la libroservo prezentas
18:00 - 19:00	vespermanĝo
19:00 - 20:15	Sebastian Kirf, GEA-prezidanto: kunlaboraj retaj iloj de GEA
poste	muzika vespera programo kun Rotraud kaj Johannes, poste knajpo

dimanĉo, 18a oktobro

07:30 - 08:30	matenmanĝo
08:30 - 09:00	redono de ĉambroj
09:30 - 11:30	instru-kurso aŭ ekskurso
12:00 - 13:30	resumo tagmanĝo , adiaŭo

Kostoj

Kotizo: 30 € (por junuloj sub-30-jaraĝaj: 15 €).

Restado en la junulargastejo, kompleta pensio por 2 tagoj:

en 4-lita ĉambro 70 €
 en 2-lita ĉambro 90 €

La aliĝo validas post alveno de via kompleta pago sur nia konto aŭ la konto de EFE aŭ de Bavelo

**Jugendherberge Burg Rabeneck
 Krähenneckstr. 4**

75180 Pforzheim-Dillweißenstein

Tel: +49 7231 972660,

Fax: +49 7231 972661

info@jugendherberge-pforzheim.de

Koordinatoj: latitudo: 48° 52' 8,09"

longitudo: 8° 40' 56,49"

Alveturo per publikaj transportiloj

Pforzheim estas trajnstacio de la vojo Karlsruhe-Stuttgart-München. La junulargastejo situas en kvartalo Dillweißenstein en la valo de rivero Nagold.

- De la stacidomo per „Kulturbahn“ (direkte al Horb) ĝis haltejo „Weißenstein“. De tie estas 7-minuta promenovojo ĝis la junulargastejo.
- alternative: per buso (linio 3) de la stacidomo ĝis haltejo „Burggartenstraße“ (20-minuta veturado). De tie 5-minuta promenovojo al la junulargastejo.

Alveturo per aŭto

Pforzheim aŭte atingeblas per ekspresvojo A8 (Karlsruhe-Stuttgart).

Venante el okcidento prenu elveturejon **Pforzheim West**, venante el oriento prenu elveturejon **Pforzheim Süd**. Daŭrigu direkte al la urbocentro. Ĉe vojkruciĝo kun strato **B463** sekvu la direkton al **Calw**.

Tio gvidos vin rekte al urboparto **Dillweißenstein**. Ĉe la ponto trans rivero Nagold en Weißenstein veturu dekstren kaj sekvu la pliajn ŝildojn.

Se estas pli facile por vi vidi la hotel-indikilojn, tiam sekvu la ŝildojn por restoracio/hotelo Rabeneck. Ĝi situas tute proksime de la junulargastejo.

Kiel atingi la monahejon Maulbronn?

... per auto (20 km nordoriente de Pforzheim)

-Koordinatoj: 49°00'01.0" norde 8°48'39.0" oriente

De la ekspresvoja elveturejo Pforzheim Nord veturu norden tra Neulingen kaj Ölbronn. Sekvu la ŝildojn al la monda heredaĵo "Kloster Maulbronn"

La kotizo rajtigas al elektita kurso. Ĝi ne repageblas.
 La aliĝo validas post alveno de mono:
 Pagebla per ĝiro al
 CCP Esperanto France-Est
 1997 72 W Nancy
 per franca ĉeko al Esperanto France-Est sendata al
 André GROSSMANN
 5, rue des Pyrénées
 68390 BALDERSHEIM
 ret-adreso: andreo.ag08@free.fr

Aliĝilo al la Bavelo/EFE-seminario en Pforzheim

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo	naskiĝjaro	Aliĝilon bonvolu sendi al: S-ino Inge SIMON, Brünner Str. 20 DE-73431AALEN Tel. 00.49-7361/ 360 615, Inge.Simon@esperanto.de
1				
2				
Adreso				Mi partoprenas: <input type="checkbox"/> trejnan kurson por instruemuloj (• ven 19:00 enkonduko • sab 9.00 kurso – generalaj moduloj • specifaj moduloj 1 • sab 17:00 la libro-servo prezentas • dim 9:30 specifaj moduloj 2) <input type="checkbox"/> programon por neinstruemuloj (•ven 19:00 enkonduko • sab 9.00 kurso, generalaj moduloj • podkastoj • sab 17:00 la libroserevo prezentas • dim 9:30 ekskurso) <input type="checkbox"/> ekskurson por frualvenintoj al la monda kulturheredaĵo Maulbronn (nepre anoncu vin frue)
Telefono:				
Ret-adreso:				
Mi pagas la sumon (aliĝo + restado)..... al Esperanto France-Est				
Tranoktado en la junulargastejo: <input type="checkbox"/> 2-lita ĉambro <input type="checkbox"/> 4-lita ĉambro				
<input type="checkbox"/> vendrede/sabate <input type="checkbox"/> sabate/dimanĉe				
Mi serĉas pli komfortan tranoktadon, bonvolu helpi min per rekomendoj				
Nombro da manĝoj	vendrede	sabate	dimanĉe	
matenmanĝo				
tagmanĝo				
vespermanĝo				
Mi ŝatas manĝi	vegetare	vegane		
Mi havas alergion kontraŭ				
				Baldaŭ eblos aliĝi elektronike ĉe la retejo http://esperanto-bw.de/seminario-eo

Novaĵoj

Esperanto-kurso en la urbo, kiu neniam dormas

Kategorio: Movado; **Dato:** 2015-08-23 09:51:23

Tre nekutima Esperanto-kurso okazis ĉi-jare en Novjorko. 12 elstaraj studentoj de la universitato de la Urbo Novjorko (CUNY), Macaulay Honors College (kie studas la plej elstaraj 0,33% de la studentaro) sekvis 10-tagan rekt-metodan kurson pri Esperanto en majo-junio 2015. La organizanto de la kurso estis Esther Schor: verkisto, poeto, profesoro ĉe la Universitato Princeton kaj ESF-konsilanto, kaj la instruisto – Bill Maxey. Tiu ĉi iniciato havis tri ĉefajn celojn: trovi manieron interesi kelkajn el la plej elstaraj gejunuloj en Novjorko pri lingvaj aferoj ĉe la sidejo de UN, veki scivolemon pri Esperanto antaŭ la apero de la libro de Esther Schor: *Ponto de Vortoj: Esperanto kaj la Revo pri Universala Lingvo*, kaj, laste, kunigi kaj kunlaborigi plej elstarajn studentojn el la kolegio. La kurso mem celis pruvi ke Esperanto estas konkreta kaj utila lingvo, forviŝi negativajn supozojn pri la lingvo kaj ties adeptoj, konatigi la strukturajn elementojn kaj la flekseblecon de la lingvo, montri ke Esperanto havas siajn kulturon kaj komunumon, kaj stimuli intereson pri plia studado kaj aliĝo al la komunumo.

El 36 kandidatoj, la 12 plej taŭgaj studentoj estis elektitaj pro siaj akademias atingo, bonfara agado, interesoj (internaciaj studoj, homaj rajtoj, lingvistiko, lingvo, literaturo) kaj la potencialo fariĝi influaj en siaj fakoj. La elektitaj studentoj ricevis malgrandan stipendion de ESF,

kun la promeso antaŭprepariĝi per Lernu.net kaj ĉeesti almenaŭ 9 el 10 lecionoj. La kurso okazis nur pere de Esperanto. Ĝiaj ĉefaj temoj estis monda problemaro, la hejmurbo de la studentoj: Novjorko, kaj la vivspertoj kaj intereso de la partoprenantoj. Inter la vizitantoj de la kurso estis la antaŭa UEA- kaj ESF-prezidanto, verkisto kaj profesoro Humphrey Tonkin, la mondkonata reĝisoro Sam Green (The Universal Language) kaj la poeto kaj eldonisto Ulrich Becker. La studentoj havis ankaŭ la okazon skajpi kun junaj esperantistoj tutmonde. Ĉiuj partoprenintoj senescepte laŭdis Lernu!-on (“bonega”, “tre helpa”, “treege helpa”, “superhelpa”, “nekredeble helpa”, “fabela rimedaro”), kaj aparte aprezataj estis la vizitantoj, kiuj “donis al la kurso homan aspekton kaj pruvis ke E-o estas viva kaj tutgloba”, laŭ unu partoprenanto. Al la studentoj tre plaĉis la eblo aŭdi la lingvon, la poemoj, la malstreĉa kurs-strukturo, la atento al studentaj interesoj kaj opinioj, la diverseco de temoj kaj la tut-Esperanta etoso. “Mi laŭgrade enamiĝis kun ĝi kaj ankaŭ sentis emon apogi la Esperanto-movadon”, skribis unu el la finintaj studentoj.



16a ĝis 20a de oktobro 2015 : Korusa renkonto, retejo www.gresillon.org/koruso

24a de oktobro ĝis 1a de novembro 2015 : kursaro AŬTUNE, retejo www.gresillon.org/autune

- AMO-seminario *'Grimpi la monton granitan'*

kun Stefan MacGill

- lingva seminario kun Christian Rivière
- rekta metodo kun Zsófia Pataki
- speciala programo por **infanoj**,
- aliaj interesaj aktivaĵoj

16 au 20 de oktobro 2015 : Rencontre chorale, site: www.gresillon.org/chorale

24 oktobro au 1 novembre 2015 : cours AŬTUNE, site www.gresillon.org/autumne

- séminaire linguistique avec Christian Rivière
- séminaire AMO *'Grimper la montagne granitique'* avec Stefan MacGill
- méthode directe avec Zsófia Pataki
- programme spécial pour les **enfants**,
- autres activités intéressantes

Esperanto-Kultur-Domo
Château de Grésillon
St. Martin d'Arcé
49150 BAUGÉ-EN-ANJOU
+33 - 241 89 10 34,
kastelo@gresillon.org

Ĉu Silvestra renkontiĝo? Ĉu de Germana Esperanto-Asocio? Ho, kio estas tio? Tio verŝajne estas via reago legante tion ĉi.

Sed vi prave legas: Germana Esperanto Asocio ekde la jarfino 2015 ofertas novan silvestran renkontiĝon!

La unua LUMINESK' okazos en Nideggen (Eifel) inter la 28.12.2015 kaj la 04.01.2016!

Legu ĉi tie pli pri la nova LUMINESK'!

Ĉefa kontaktpersono: Andreas Diemel

Pliaj kontaktinformoj: <http://luminesk.eo.tel>



Nova silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio



Esperantista Migrado Aŭtuna refoje en Rejnlando-Palatinato (5a EMA 2015)

Al la 5a EMA. kiu okazos de dimanĉo. de la 18a de oktobro ĝis vendredo. la 23a de oktobro 2015 en 53505 Altenahr ĉe le *rivero* Ahr ĝis hodiaŭ aliĝis 26 personoj el kvar landoj. Ankoraŭ eblas aliĝi

<http://www.esperanto.de/civCRM/event/info?reset=1&id=4>

Ni lernu per distraĵoj

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2			■				■			
3					■				■	
4										
5						■				
6			■						■	
7					■					
8		■					■			
9								■		
10					■					

Humuraĵoj

KORATAKO: LA KIALO

En Japanio, kie oni konsumas malmulte da graso, la nombro de la koratakoj estas pli malgranda ol en Anglio kaj en Usono. Aliflanke en Francio, kie oni konsumas sufiĉe multe da graso, la nombro de la koratakoj estas same pli malgranda ol en Anglio kaj en Usono. En Barato, kie oni apenaŭ trinkas iom da ruĝa vino, la nombro de la koratakoj estas pli malgranda ol en Anglio kaj en Usono. En Hispanio, kie oni trinkas sufiĉe multe da ruĝa vino kaj manĝas multe da paprikitaj kolbasoj, la nombro de la koratakoj estas same pli malgranda ol en Anglio kaj en Usono.

En Alĝerio, kie oni apenaŭ amoras, la nombro de la koratakoj estas pli malgranda ol en Anglio kaj en Usono. En Brazilo, kie oni multe amoras, la nombro de la koratakoj estas same pli malgranda ol en Anglio kaj en Usono.

KONKLUDO: Manĝu, drinku kaj amoru laŭplaĉe, ĉar ŝajne tio, kio mortigas, estas la angla lingvo mem.

Tradukis el la hungara:

Imre SZAB

SURPRIZO

Edzo aĉetas nilonajn ŝtrumpojn kaj petas al vendistino:

- Bonvolu pakigi por donaco
- - Ĉu vi surprizos vian edzinon?
- - Jes. Estos granda surprizo. Ŝi atendas peltan kor-saĵon!

Viro montras al amiko la ringon kun diamanto, kiun li aĉetis por la naskiĝ-dato de sia edzino.

- Ho, belega, sed mi kredis, ke ŝi deziras veturilon BMW ?

- Jes, mi scias, sed estas malfacile trovi iun falsan.

HORIZONTALA

1. Malantaŭa krani'.
2. Pronomo. Kolekt' de leĝoj. INVERSE: italia insul'.
3. Viro laŭleĝe ligita kun virino. Plandmarŝa best'.
4. Presita skribaĵ' por komuniki ion.
5. INVERSE: proza verk'. Rilata al verkado.
6. Sufikso. Estu akceptata ĉe la tablo.
7. Paperfoliar' kun presita teksto. Opuntio.
8. Konkur' en kiu oni devas plenumi difinitajn elprovojn. INV.: malutil'.
9. Skriba konsist' de la vortoj kompare kun la sonprononca. Pronomo.
10. La 90a radioaktiva element'. Antikva konser-vita kadavro.

VERTIKALE

1. Scienca stud' de la maroj.
2. Perforte forkapti homon. Litera nomo.
3. Objektiv' de kamerao. Grenŝel'.
4. Bildrepertuar' pri difinita homo.
5. Litera nomo. En la mezo de vicrado. Pronomo.
6. INVERSE: sin distri. Dividiĝ' de unu eklezio en du.
7. Vertikale staranta. Simbolo de mikro.
8. Ĝen' kaŭzita de amaso de objektoj tra vojo.
9. Regnokodo de Sieraleone. Ene sen la ena litero. Tonus'.
10. Ŝatata legomo ofte nomata "NovZelanda spinaĉo".

SOLVO de la numero 170 :

HORIZONTALA

- 1) BABILONIO. 2) REAGO. ALD. 3) ARGANOJ 4) MOD. GILDO. 5) AGAD. 6) NOD. STA. 7) IKO-NOSKOP. 8) SN. ERCO. 9) MILIMETRO.

VERTIKALE

- 1) BRAMANISM. 2) AERO. OKNI. 3) BAGDADO. 4) IGA. NEI. 5) LONGAFORM. 6) OID. SCE. 7) NAJL. SKOT. 8) IL. DATO. 9) ODNO. APRO.

Ĉu vi ebrias?

Jes

Ne

ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2016 ĝis 2018


Nia asocio **Esperanto France-Est** havas la rajton atesti pri ricevataj donacoj aŭ kotizoj, dekalkuleblaj de la impostoj. La principo estas, ke eblas dekalkuli de la impostoj 66% de donaco aŭ kotizo al nia asocio. Tial ni povas proponi al vi kotizon je 20 eŭroj el kiuj 66% povas esti dekalkulitaj de viaj impostoj. Tiam entute vi estos paginta $20 - 66\% = 6,80$ eŭroj, sed nia asocio estos tamen ricevinta 20 eŭrojn. Se vi pagas tian kotizon aŭ pli, nia kasisto sendos al vi ateston, kiun vi povos aldoni al via imposto deklaro.

La atestoj rilatas al pagoj de kotizoj kaj donacoj ricevataj en 2015 (principe ĝis la 31a de decembro) por la imposto-deklaro de 2016.

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2015, pagi vian abonon al **La Informilo** laŭ la ĉi-suba tarifo. Ni povas ankaŭ proponi al vi retan version en formato pdf duonkoste kompare kun la papera versio.

Krome vi povas elekti inter la 2 membro-kotizoj por nia asocio, laŭ via situacio rilate al impostoj.

		Jaroj:	2016	2017	2018
		Abono por la papera versio:	15 eŭroj	15 eŭroj	15 eŭroj
		Abono por reta versio en formato pdf:	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj
		Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj:	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
UEA	MG MJ(-T)	<ul style="list-style-type: none"> • Individua Membro kun Gvid-libro tra la Esperanto-movado. • Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkluzive 29 jarojn, membro en TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago). 			11 eŭroj 26 eŭroj
	MA(-T)	<ul style="list-style-type: none"> • Individua Membro-abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo Esperanto 			63 eŭroj
Pag- manieroj	1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2016 por 1208				
	2. Per bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de: <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2016, 2017				
	3. Por Germanio al nia peranto: Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen, je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)				
	4. Per internacia ĝiro je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adreskodon)				



Rememoroj pri Tempo de Silko kaj Pajlo
 Estas kolekto de tre interesaj rakontoj pri malnova Japanio, inter la fino de la 19a jarcento kaj la nuna moderna Japanio
 La libro estas tre bele ilustrita de Susumu Saga kaj tradukita de Judyta Szczerbicka Yamato:
 Aŭfrankite 26 eŭroj

Poŝamiko

Jen agrabla libreto, kiu trafe prezentas sur 40 paĝoj, gramatikajn resumojn, tekstetojn, kelkajn ekzercojn kaj laŭtemajn bildvortarojn riĉe kolor-ilustritajn. La poŝforma eldonaĵo (A6) bone povas servi kiel poŝlibreto al kursanoj je komencanta kaj komen-cinta niveloj, aŭ kiel varbo-celaj donacoj kaj propagandiloj.
 Aŭfrankite: 6,50 eŭroj



La 100-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Lillo, de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2015

Cent dek jaroj pasis de post la unua Universala Kongreso okazinta en Bulonjo-ĉe-Mar. Ĉi-foje oni elektis kiel kongresurbon Lillo en nord-orienta parto de Francio. La kongreso okazis en moderna konstruaĵo *Lille Grand Palais*. Al ĝi enskribiĝis 2689 personoj el 81 landoj de kvin kontinentoj: rekorda nombro da partoprenantoj de UK-oj okazintaj en la 21a jarcento. Informoj pri la evento estis bone disvastigitaj. En la urbo aperis multaj afiŝoj pri la aranĝo kaj pri la publika programo, kiu okazis ĉiutage posttagmeze sur la placo de la Teatro. Prezentiĝis diversaj muzikgrupoj inter kiuj ne mankis JoMo, La Kompanoj, Kapriol, Kajto.

La temo de la kongreso estis: “Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj”. La programo estis varia kaj riĉa kun interesaj prelegoj, diskutoj, debatoj, E-kursoj kaj lingvokursoj, KER-ekzamenoj, filmoj, teatraĵoj, koncertoj, ekspozicioj, spektakloj kaj muzikaj prezentoj. Ĝi montris ampleksan kulturon kreitan de esperantistaro. Libroservo prezentis abundan kaj varian stokon da libroj, T-ĉemizojn kaj aliajn esperantaĵojn. Okazis multnombraj eroj kaj aktivaĵoj. Kunvenis akademianoj, medicinistoj, fervojistoj, ateistoj, spiritistoj, bahaanoj, komunistoj, juristoj, blinduloj, skoltoj, vegetaranoj, komercistoj, matematikistoj, radioamatoroj, nefumantoj, kat-amantoj, SAT-anoj, legantoj de la revuo “Esperanto”. Plurfoje estis pritraktita la kongresa temo, okazis IKU-prelegoj kaj serio da prelegoj pri Francio, vinseminario, oratora konkurso. Formiĝis internacia koruso sub gvido de Alan Bishop el Aŭstralio.

La poresperanta programo komenciĝis per Movada Foiro. Ĝi estas unu el la plej ŝatataj aranĝoj dum la UK-oj. Tie sur 120 tabletoj diversaj asocioj prezentis allogan E-materialon kaj informis pri sia agado. Ĝi estas granda renkontiĝejo kun malnovaj kaj novaj amikoj.

Dimanĉe okazis la Solena malfermo de la kongreso. Unuafoje en la historio de la Universalaj Kongresoj ĝi estis rekte elsendita per interreto. Esperantistoj el pluraj partoj de la mondo povis sekvi ĝin. Kortuŝa estis la salutparolado de Louis Christoph Zaleski-Zamenhof, la nepo de la Majstro. La solenaĵon li ĉeestis kaj alparolis la publikon ankaŭ la alta protektanto de la 100-a UK, la urbestro de Bulonjo-ĉe-Maroro Frédéric Cuvillier.

La kongresa kuriero *Belfrido* ĉiutage informis pri novaĵoj, ŝanĝoj kaj aldonis liston de novaj kongresantoj. Ankaŭ la loka gazeto *La Voix du Nord* (La Norda Voĉo) ĉiutage informis pri kongresaj eventoj. Ne mankis intervjuoj kaj televid-elsendoj.

Veronika Poór estis elektita Ĝenerala Direktoro de UEA. Indonezio estis akceptita kiel nova Landa Asocio. Dekdu esperantistoj ricevis diplomon pri elstara agado kaj pri elstara arta agado.



Amika tago en Remiremont (Vogezoj) la 13an de Junio 2015

Inter la 11a30 kaj la 12a matene ni rendezuis apud la lageto de Remiremont "Plan d'eau", (akvo-etendejo). Entute ni estis dek-kvin: 5 el la grupo de Frajburgo, 3 el la grupo de Mulhouse kaj 7 el la grupo de Gérardmer. Post iom da babiladoj Manfred proponis ĉerizojn al ĉiuj kaj petis min fari nodon per tigo en mia buŝo sen interveno de la manoj. Tion mi faris. Tio estas amuzaĵo por mi, sed mi suspektas, ke oni petas tion de mi, kiam oni volas silentigi min. Provu paroli kun tigo de ĉerizo en la buŝo, fabrikante nodon!

Poste-ĉar iom pluvetis-ni iris manĝi en la restoracio de la supermarkto Cora.

Tie ni havis bonŝancon: ne tro da homoj, tabloj kunigitaj por 12 personoj kaj liberaj tabloj apude, etoso ne brua, sed kvieta. Tial la grupo ne disiĝis kaj ni provis babili sen krokodili.

Poste ni havis rendezuon ĉe la "Fuorto de Parmont", kie mi rezervintis gvidanton je la 14a30. Tiu tre simpatia gvidanto, s-ro Grosjean, donis multege da klarigoj kaj ne tro rapidis, atendis tradukojn de mi aŭ de Andreo Grossmann, kaj respondis al ĉiuj demandoj niaj dum preskaŭ du horoj.

Iom da historio: Tiu fuorto estis konstruita inter 1874 kaj 1876 sekve de la milito de 1870, la celo estis iam repreni la teritoriojn aneksitajn de la germanoj. Tri mil homoj laboris por konstrui ĝin dum 22 monatoj laŭ la planoj de generalo Séré de Rivières: iu "ankoraŭ pli kapabla Vauban", laŭ nia gvidanto. Tiu generalo estris la konstruon de 450 pli-malpli similaj fuortoj laŭlonge de la limo de la nov-aneksitaj teritorioj kaj ĝis la sudo de Francujo.

Fakte tiu fuorto de Parmont ne estis uzita por pafi, nur por flegi vunditojn dum la milito de 1914-1918. Inter la du grandaj militoj kaj poste ĝi utilis nur por trejnado de soldatoj.

En 1940 la germanoj ekokupis tiun fuorton, sen rezisto de la francoj, ĉar dum tiu lasta milito la armiloj tiom progresintis, ke la fuorto ne plu estis efika. La germanoj prenis ĉiujn metalajn pecojn, kanonojn, ktp. . . Pro tio la bonvolemuloj, kiuj aktuale decidis restaŭri la fuorton devis kolekti ĉiujn mankantajn pecojn ĉe aliaj similaj fuortoj.

Jesja, en 1960, la fuorto estis definitive forlasita kaj dormis ĝis kiam bonvolemuloj komencis restaŭri ĝin en 2008. Tiu laboro estas rimarkeble bone farita.

Nun la vizito: Ni unue trapaŝis metalan ponteton super fosaĵo kaj ĉe la alia flanko de la ponto troviĝas fortika krado, kiun la gvidisto malŝlosis kaj malfermis. Poste ni denove ekvidis netraireblan fosaĵon. Tiam nia gvidanto manovris mekanismon, kiu puŝis specialan ponton kaj tiu lasta, flankenglitante iom post iom, kovras la fosaĵon. Tia sistemo malofte videblas, ekzistas nur du ekzempleroj. Mi admiras, ke unu viro sola povas fari la manovron.

Nun eblas paŝi kaj eniri.

Kio okulfrapis min dum la eniro, tio estas la kvanto de lumo en la diversaj ĉambroj. La soldatoj loĝis sub la tero, jes, sed la lumo enfluas per interna korto kaj per subĉielaj koridoroj; tra la fenestroj, la soldatoj vidas la naturan lumon, ankaŭ tra pluraj lumo-putoj, kiuj rigardas al la ĉielo.

Nur la ĉambro por eksplodaĵoj estas tute senluma kaj neniu rajtas eniri kun iu ajn lampo. Oni devas meti lampon sur la breton de la apuda fenestreto, kies vitro dikas preskaŭ du centimetrojn.

Tiu fuorto kaj similaj ricevis bonajn novajn teknikaĵojn: la hejt-fornoj por la ĉambroj de soldatoj havas elir-tubon, kiu apartigas la fumon, kiu iras eksteren, kaj la varman aeron, kiu revenas tra la plafono; aliaj instalaĵoj kolektas la pluv-akvon kaj alportas ĝin al granda kuvo, en kiu ĝi estas kribrita; aparatoj por



sendi lum-signalon povas esti uzata tage per la sun-lumo kaj vintre per lumo de lampo. La soldatoj komunikis per mors-signaloj. Per serio da speguloj la signaloj estis produktataj interne kaj iris al 40 km ekstere, ĉefe al la plej proksimaj fuortoj kaj poste de fuorto al fuorto.

Granda bakujo por pano ebligis baki panon por 400 soldatoj. Aktuale, unufoje jare, la bonvolemuloj bakas panon (pli ol cent bulojn en unu fojo) dum la festo de la fuorto.

La soldatoj manĝis en siaj dormo-ĉambroj sur du-etaĝaj litoj. Apud ili troviĝis bretoj pendantaj de la plafono por meti panon kaj protekti tiun ĉi de la ronguloj. Apud la pano estis la manĝilaro: forkoj, kuletoj, ktp.

Ekzistas flegejo, pli bonaj ĉambroj por la superuloj, telegrafio-ĉambro (kiam elektro povis esti uzata). Kanario en kaĝo ne sendis mesaĝon kiel la kolomboj en Douaumont, sed pruvis ke la aero estis sufiĉe pura. En kazo de danĝera aero la kanario agitiĝis antaŭ ol morti.

Estis relative komforta vivo por la soldatoj krom koncerne la necesejojn, kiuj konsistis nur en kvin rondaj truoj en kovrita ejo; la necesejoj de la superuloj estis pli modernaj.

Ni lernis pri la pafa rolo de tiu fuorto, pri la kanonoj, la fusiloj, ktp. . sed la plej bela surprizo estis la vido de kaproj, kaprinoj kaj kapridoj, kiuj donis tre vivan aspekton al la tuto. Tiuj gekaproj estas utiligataj

por tondi la herbojn ekstere, ili ankaŭ vivas tie vintre kaj ricevas fojnjon. La respondeculoj donas aŭ vendas la idojn, kiam tiuj ĉi tro multnombras; ili ne melkas la kaprinojn, la lakto estas por la kapridoj.

Post la vido de tiuj ĉi ĉarmaj bestoj ni grimpis ĝis la supro de la fuorto kaj havis belegan panoramon al la tuta urbo. Tio estis vere impresa.

Post foto de la grupo kun la gvidanto kaj vizito de la ekspozicio de fotoj pri la restaŭr-laboroj, ni veturis ĝis la

“marĉo de la vulpo”, en la apuda arbaro. Tie ni trovis agrablegan trankvilan pejzagon, tablon kaj benkojn, kaj ni dividis diversajn kukojn kaj trinkaĵojn ĝis la disiĝo.

Vere agrablegan tagon ni havis.

Ginette MARTIN

Por scii pli multe pri la fuorto, rigardu www.le-fort-du-parmont.com





Estrara Komunikilo: EKO 2015-27 sendita al Oostendo, la 22an de julio.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aligintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj kaj unuopuloj.



Salutoj de UEA al la Konferenco de ILEI

La prezidanto de UEA, Mark Fettes, sendis saluton, kiu aperis en la Konferenca Libro. Malferme, li skribis: “Kunvenante sur belga tero, vi ne devos longe serĉi por trovi spurojn de la ‘grandaj militoj’, al kiuj aludas via konferenca temo. Tiuj militoj lasis cikatrojn ne nur sur la pejzaĝo de Belgio sed ankaŭ en la koroj kaj memoroj de ĉiuj popoloj, kiuj trovis sin envolvitaj en tiuj malhelaj eventoj. Por eviti ripeti ilin, ni devas unuavice ne forgesi ilin, kaj klopodi ĉerpi instruojn el ili.”

La vicprezidanto de UEA, Stefan MacGill, salutis persone. Jen resumo de liaj vortoj: “Granda paco. Tion oni devas pene konstrui kaj poste flegadi, de generacio al generacio”. Reprenante vortojn de Mark Fettes, li diris plie: “Tiu devo emfazas la gravegan rolon de edukado en la defendado kaj fortigo de la paco. Esperantistaj instruistoj estas aparte konvenaj por plenumi tiun edukan rolon – unue, ili estas vaste dissemitaj tra la mondo, due, ili tendencas havi internaciecan kaj interkulturan sintenojn.”



Prezento kultura en publika placo kun urbanoj kaj esperantistoj

Poste li memorigis pri la konferenca historio; okazis ĝis nun nur tri konferencoj kun pli ol 150 partoprenantoj: en Locarno 1979 (CH), Gödöllo 1981 (HU) kaj Lodz 1987 (PL). Pri UEA li raportis, ke laborplanoj por 2015-16 kaj propono por 2017-2020 estas en aktiva preparo. Fine li menciis bonvenige la jubilean Universalan Kongreson, kiu sekvos tuj post la nuna kunveno.



Jasuo Hori el Japanio, demonstrante nekutimajn muzikilojn.

Mia vojaĝoj tra Irano Raportas Bruno Henry (sekvo de antaŭa numero)

Tiu regiono estas pripluvita kaj humida. Tio ebligas kultivi rizon, kiu estas irana baza manĝaĵo. Tie oni kultivas multajn diversajn legomojn. Silkon (Delikata kaj brila fadeno sekreciita de iu speco de raŭpo) ankaŭ tabakon, kaj teon oni produktas. Oni fiŝkaptas sturĝon (primitiva rabofiŝo, iom ŝarkoforma, vivanta en eŭropaj maroj, sed preskaŭ formortinta) en la Kaspia Maro por elpreni kaviaron, kiun oni eksportas.

Kun Akbar, per aŭto, ni veturis al Bandar-e Anzali, haveno ĉe la Kaspia Maro.

Mi malkovris la Kaspian Maron. Ĝi estas blua verda kaj moviĝas multe. La irananoj de aliaj regionoj ŝatas sin bani tie, ĉar malpli varmas. En la sudo ĉe la Persa Golfo la temperaturo superas pli ol 40 gradojn! Nuntempe estas malpermesite naĝi, ĉar la ondoj estas altaj. La malpermesita rando de la plaĝo kaj ĉe la maro estas limigita per ŝnuro. La naĝgardisto fajfas al tiuj homoj, kiuj sin riskas transpaŝi la ŝnuron. Multaj homoj sin banas. La virinoj sin banas tute vestitaj kun kaptuko. Kiam eblas naĝi, la virinoj kun bankostumo sin banas en por virinoj rezervita parto, kiu estas kaŝita per granda tolaĵo kontraŭ la vido de la viroj. La akvo estas agrabla kaj varma. La fundo estas malprofunda.

La Kaspia Maro ĉirkaŭbanas Rusion, Kazakion, Turkmenion, Azerbajĝanon kaj Iranon.

Poste ni veturis al Fuman, ĉefurbo de Krakeno "kalouches", tio estas rondforma kuko kun nukso kaj cinamo (Aroma ŝelo de cinamujo, uzata kiel spico). Monumento honore al tiu kuko staras en la urbocentro. Ni frandeme etapis por gustumi krakenojn vere bongustajn kaj dolĉajn!

Ni iris al Mansouleh je altitudo de 1500 metroj. La vojturniĝoj pli kaj pli mallarĝiĝis kaj la deklivo krutiĝis. La unuaj kremkoloraj domoj ekaperis. Konstruitaj ĉe la flanko de montetoj, ili ŝajnas kvazaŭ supermetitaj! Inter la loĝejoj, stratetoj direktas al bazar! La pitoreskaj domoj en okra tono estas terase konstruitaj ĉe la flanko

de la montaro kaj sur la plataj tegmentoj kuŝas stratetoj. Tiumaniere oni povas marŝi sur la tegmentoj de la malsupraj stratetoj! Strange por mi! Turistoj estas nur irananoj. Ni ne renkontis eksterlandanojn. La vilaĝo vicigas multajn butikojn kaj restoraciojn. Poste ni iris per vojeto

direkte al la kastelo, kiu staras en la arbaro. Akbar nomas tiun kastelon "Rivera kastelo".

Piede ni grimpis ŝtuparon, kiu laŭiras proksime de torento. Miloĵoj da irananoj, piknikas aŭ tendumas laŭ la vojeto kaj la torento, ĉar tie estas ombro kaj freŝeco. Staras budoj kovritaj per ŝirmtoilaĵoj, kie oni vendas turistmemoraĵojn, kebabojn, trinkaĵojn kaj regionajn produktaĵojn, kiel iun karbokoloran konfitaĵon.

La kreskaĵoj estas abundaj en tiu mirinda natura loko. Bedaŭrinde multajn rubaĵojn oni forlasis tie, plastajn sakojn, plastajn botelojn ktp. . . Troviĝas malmulte da rubujoj.

Post tri tagoj en Rascht, kiam mi forveturis al Teherano, la buso preterpasis grandan elektran baraĝon, kiu tenas grandan lagon, kiu ricevas akvon per larĝa torento. Ĉe la rando de la lago aperas pluraj ventogeneratoroj. Tiu lando enhavas multajn energiajn riĉfontojn: petrolon, venton kaj sunon.

Mi finis mian restadon ĉe Hamzeeh en Tehrano kaj busveturis de Teherano al Istanbul, 3000 km-ojn for en 35 horoj. Bedaŭrinde ne plu estis loko por mi en la trajno, kiu veturis unufoje en la semajno al Ankaru!



Vivo kaj impresoj pri Irano

Oni uzas en Irano muzulmanan kalendaron. Ni estis en la jaro 1391 kaj en aliaj landoj estis la jaro 2012. La skribo estas araba sed la lingvo estas persa. La ciferoj ne estas arabaj, sed persaj (ili devenas el Hindio). La irananoj ne estas araboj, sed azia popolo. Vendredo en Irano estas kiel dimanĉo en Francio, neniu laboras.

Kiam okazas fasto, oni ne rajtas trinki kaj manĝi dum la tago, sed post la sunsubiro oni povas manĝi kaj trinki. Nur la vojaĝantoj povas manĝi kaj trinki.

Viroj rajtas surmeti ĉemizojn, sed ne mallongajn pantalonojn. Virinoj eĉ eksterlandaj devas surmeti kaptukon.

Oni manĝas per kulero kaj tranĉas per forketo.

En necesejo necesas forlasi la pantoflojn kaj surmeti plastajn sandalojn.

Foje irananoj diris al mi, ke multaj eksterlandanoj opinias, ke irananoj estas teroristoj! Pri tio ili ne konsentas. "Vi ne havos problemojn kun irananoj" ili diris al mi. Mi spertis neniam problemojn kaj streĉojn ĉi-tie. Irananoj estas agrablaj kaj gastemaj kun eksterlandanoj. Ili tre ŝatas alilandanojn kaj emas scii pri ili. Mi fartis bone

en tiu lando! Amas-komunikiloj en Eŭropo ne montras bonan bildon pri Irano. Sed la realo estas tute alia.

Multaj irananoj estas kleraj, ŝatas poezion. Virinoj estas pli nombraj ol la viroj en la universitatoj. Multaj virinoj ne emas surmeti kaptukon! Irananoj ŝatas infanojn kaj zorgas pri maljunaj gepatroj. Multaj plendas pro la registaro. La ekonomia situacio estas tre malbona: senlaboreco kreskas, ĉiuj prezoj altiĝas konstante, pli rapide ol la salajroj, kelkfoje laboristoj ricevas malfrue sian salajron. Prezo de benzino duobliĝis. Teokratio kaj mulaoj (disservanto ĉe islamanoj) premas la homojn: ne estas esprim-libereco, liberaj amas-komunikiloj, homoj ne rajtas manifestacii, virinoj devas surmeti kaptukon, malpermesatas trinki surstrate dum ramadano. Religia polico nomita "Gasht e Ershad" (Polico de la Virto) kontroladas, ke la virinoj estu kovritaj de la kapo ĝis la piedoj. Por la viroj ili estas pli toleremaj, ĉar kelkaj viroj surmetas ĉemizojn kun mallongaj manikoj.

Oni ne rajtas kanti kaj danci publike en Irano. Kelkaj geantistoj kantas eksterlande!



Trojan Bulgario

Post la busa vojaĝo de Teherano al Istanbul mi pasigis unu tagon en tiu ĉi bela urbo por ĝui la etoson en moskeo. Vespere mi forveturis de la stacidomo Sirkeci kaj post 24 horoj mi atingis Trojan. Ĉie tie gastigis min fervojista amiko Pavlin en urbeto Trojan ĉe la montaro Balkano. Mi prelegis pri Irano por esperantistoj kaj emerituloj. Pavlin tradukis en la bulgaran lingvon. Oni faris multajn demandojn pri la vivkondiĉoj de virinoj en Irano.



Bukareŝto Rumanio

Post tri tagoj en Trojan kaj unu nokto en trajno mi trarigardis Bukareŝton, ĉefurbon de Rumanio dum kelkaj ho-



roj inter du trajnoj. Mi jam vizitis ĝin en 1981. En tiu epoko ĝi aspektis tre aŭstera sed enhavis malnovajn kaj tipajn kvartalojn kun belaj prejeĝetoj. Bedaŭrinde eks-prezidento Ceaucescu malkonstruigis ilin por starigi gigantajn parlamentejon kaj domegojn por loĝigi ŝtatajn oficistojn.

Balatonederics Hungario

Mi forveturis vespere de Bukareŝto per nokta trajno ĝis Budapeŝto kaj ŝanĝis trajnon ĉie-tie por veturi al la lago Balatono. Otto, mia malnova amiko, gastigis min en vilaĝo Balatonederics apud granda lago Balatono tre fama en Eŭropo. Julio Baghy, fama hungara verkisto, poeto kaj instruisto instruis al li Esperanto en la jaroj 1950-aj. Mi banis min en la varma lageto Heviz proksime de Balatono. La temperaturo en tiu lageto estis je 31 gradoj super nulo. La akvo tre taŭgas kontraŭ artrozo!

Mlada Boleslav Ĉeĥio

Post du tagoj ĉe Lago Balatono mi trajnveturis tra Hungario kaj Slovakio dum unu tago al Ĉeĥio. En Mlada Boleslav norde de Prago gastigis min geesperantistoj kaj Jindra, kun kiu mi konatiĝis antaŭ 20 jaroj.

Ĉeĥio tre ŝanĝiĝis post la disfalo de socialismo en 1989. Urboj pli beliĝis sed la senlaboreco kreskis. Antaŭe la medicino estis senpaga kaj preventa. Nun la popolo pagas parton de la kuracado kaj la kuracilojn.

Mi prelegis pri mia vojaĝo kaj oni starigis al mi multajn demandojn pri rajtoj de virinoj en Irano.

Jindra klarigis al la neesperantistoj, kio estas Esperanto kaj kiamaniere mi vojaĝis dank'al Esperanto kaj Pasporta Servo.

Mi vizitis la klubon de Prago. Prago estas la ĉefurbo de Ĉeĥio, unu el la plej belaj ĉefurboj en Eŭropo.

Mi parolis al ili pri Irano kaj Margrit, kiu instruis al mi Esperanton en Ĉeĥio antaŭ kelkaj jaroj kaj mi ĝojis, ke la Esperantomovado estas vigla en Irano.

Mi reveturis trajne dum unu tago al Francio tra Ĉeĥio kaj Germanio kun kapo plena je mirindaj memoraĵoj post dumonata rondvojaĝo!



Bruno HENRY



ÈVÈNEMENT
Mondial d'esperanto. Jusqu'à demain. Un programme composé de cours express, d'expositions, de concerts, d'animations musicales...
 Aujourd'hui :
 - Atelier de chant en esperanto avec le duo Kajto. À 10 h, place du Théâtre, Lille. Gratuit.
 - Match international de football (Espéranto/Sahara occidental). À 18 h, Stadium Lille métropole, avenue de la Châtellenie, Villeneuve-d'Ascq. Gratuit.



100^e Universala Kongreso de Esperanto
 Lille, 25 julio-1 aŭgusto 2015

BONVENON
 Esperanto, giganta paŝo por la homaro
 Esperanto, un pas de géant pour l'humanité

KORAJN KONGRESAJN SALUTOJN



Ĝis revido en Nitra!
Ĝis revido en UK 2016!